**La 25-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO
TOSSA DE MAR 30.9. - 7.10 2017**

La jubilea Esperanto-Semajno estis ĉi-jare organizita fare de la nova teamo de katalunaj esperantistoj. La torĉon transprenis la ĉeforganizantino Rosa López. Luis Serrano Pérez, kiu senlace laboris por Esperanto ĝis la lasta momento de sia vivo, forpasis la 24-an de aŭgusto en sia 91ª jaro. Ni omaĝis lin dum la renkontiĝo.
La eventon partoprenis 108 geesperantistoj el 12 landoj (Belgio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irlando, Italio, Latvio, Litovio, Svedio, Svislando). La evento okazis en kvarstela hotelo *Don Juan*. Je dispono estis granda naĝbazeno sur tegmenta teraso, kie kelkaj el ni agrable baniĝis. Ne agrabla estis renkonto kun meduzoj de du partoprenantinoj, kiuj volis ĝui la maron.

Dimanĉe okazis malfermo de la Semajno. Bonvenigis nin la skabeno de la urbodomo s-ro Sergio Bruno. Pro la balotado por la sendependiĝo de Katalunio la urbestrino Gisela Saladich Parés ne povis ĉeesti la solenaĵon.
La programo estis riĉa kaj tamen restis multe da tempo por ripozi. Okazis du interkonaj vesperoj kun ŝaŭm-vino kaj "moskatel"-vino kaj kelkaj almanĝaĵoj. Krome ne mankis tradicia *cremat*-vespero.
Ateliero pri Esperanto temis pri praktikado de la lingvo, sperte gvidate de Luz Vázquez, kiu ankaŭ prezentis sanigadon de Bruno Gröning laŭ spiritaj fortoj. Ana Manero sciigis nin pri la madrida biblioteko Juan Regulo Pérez. Gian Carlo Fighiera prezentis du dramojn de *Shakespearo*: *Macbeth* kaj *Hamlet.* Ĉiuj bone amuziĝis ĉe la ludo: Kiu volas fariĝi milonulo ? inspirita laŭ televida programo "Ĉu vi volas fariĝi milionulo?" En niaj modestaj kondiĉoj ni kontentiĝis nur pri milonulo. Ĝi estis preparita kaj tre lerte prezentata de José Antonio del Barrio (Tonjo). Li ankaŭ informis pri la nuna stato de Esperanto en Hispanio. Thierry Saladin parolis pri la Internacia peticio kaj projekto TUJ! Li ne forgesis vendadi porokazajn T-ĉemizojn.

Aperis nova programero "Peĉakuĉo", en kiu ĉiu partoprenanto devas rakonti en limigita tempo pri difinita temo helpe de bildoj. Komencis Tonjo pri la temo: "Kiel filoj de esperantistoj estas geniuloj", Hubert De Meyere klarigis kiel "Uzi sian kapon", Angel Garcia parolis pri "Kosmaj distancoj kaj vojaĝoj", Martine Demouy promenigis nin tra la urbo "Périgueux", Michel Chadelaud informis pri migrado kun sia edzino Annette dum "16 tagoj sur la pado de Kompostelo". André Grossmann prezentis diversajn trukfotojn. Ĝi estis tre interesa programo.
Okazis aŭkcio por akiri iom da mono por la asocio. Kun granda sukceso prezentis ĝin Tonjo. Vendiĝis pluraj donacitaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj kun aldonaj objektoj.
Dum la ĵaŭda vespero la folklora grupo *Esbart San Pol de Mar* regalis nin per belega spektaklo de tipe katalunaj dancoj. Ĉe la fino estis prezentata danco *sardana* kaj la dezirantoj povis kundanci.
La kutiman programeron de opero anstataŭis deklamado de poezio, kiun iniciatis Angel Argilos ŝatanto kaj verkisto de poemoj. Partoprenis pluraj samideanoj. Pri latviaj birdoj kaj kuraĝaj junuloj ni eksciis de Aldis Buŝs. La vendreda vespero finiĝis per kolektiva kantado sub gvido de Jeanne Draime kaj Martine Demouy.

La premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Ana Manero pro ŝia meritplena laboro por Esperanto en Hispanio. La nove ellaborita trofeo kun portreto de Ada tre plaĉis al ĉiuj. Ankaŭ Gian Carlo Fighiera ricevis ĝin por rememoro pri sia kara edzino.

Dum la unua duontaga ekskurso okazis gvidata vizito en la urbeto *Tossa de Mar.* La ĉiĉerono konigis al ni ĝian historion kaj montris interesajn lokojn. Impona estas la kastelo, kiu etendiĝas sur la monteto, de kie ni observis la marbordon kaj la vastan ĉirkaŭaĵon. Montrante la E-ŝildon ni povis senpage viziti la urban muzeon.
Dum la tuttaga ekskurso ni malkovris la belan urbeton *Besalú*. Pro sia ĉarmo ĝi estas invadita de turistoj. Ankaŭ ĉi tie ni ĝuis promenadon kun loka ĉiĉeronino kun brila tradukado de José María Salguero (Kani). Estis sufiĉe da tempo por trankvile ripozi, kafumi aŭ bierumi. Ankaŭ glaciaĵoj bongustis.
En la dua duontaga ekskurso ni promenis kaj admiris la belegan kaj ekzotikan botanikan ĝardenon *Marimurtra* en *Blanes.* Diversaj mediteraneaj kaj ekzotikaj plantoj kaptis nian atenton. Ankaŭ diversaj kaktoj, bambuoj kaj palmoj troviĝas tie. Ni eĉ gustumis kelkajn maturiĝantajn fruktojn ĵus falintajn de la arbo. Iuj fotiĝis kun papagoj.

Konklude la E-Semajno bone disvolviĝis. Dankon al la nova teamo pro tre agrablaj tagoj pasigitaj en *Tossa de Mar.*

*Liba Gabalda*